# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 1 (940) • 2020 •


DIA REGNO

ISSN 0167-9554

## Episkopa letero pri la klimato

Episkoparo de la Sveda eklezio, 2019





LETTERA ENCICLICA

*LAUDATO SI'*

DEL SANTO PADRE

FRANCESCO

SULLA CURA DELLA CASA COMUNE

LIBRERIA EDITRICE VATICANA

## Laŭdata estu

### Pri la prizorgo de la komuna domo

Encikliko de la papo Francisko, 2015

# KELI

**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*



**Prezidanto**: Philippe Cousson
🖂 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021; 💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel Polnický;
🖂 Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
✆ +420 723 672 335;
💻 polnickypavel@seznam.cz

**Kasisto**: Ágnes Ráczkevy-Eötvös
🖂 Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
✆ +36 302 000 306;
💻 agnes@raczkevy-eotvos.com



**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP; IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

## DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof Åradsson
🖂 Kungsgatan 13B; SE-281 48 Hässleholm; Svedio
✆ +46 70 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Pavel Polnický

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).



***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***



**Ekspedado:** Pavel Polnický
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.


## Enhavo


| | |
|---|---|
| Klimato kaj teologio | 3 |
| Episkopa letero pri la klimato | 4 |
| Laŭdata estu | 5 |
| Homa respondeco | 7 |
| Loto kaj lia edzino instruas nin | 10 |
| La dekunua ordono: ”Ne estu indiferentaj!” | 15 |
| Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj | 18 |
| Apostoloj kaj iliaj atributoj | 20 |
| Kongresa informo – aliĝintoj | 22 |
| Josef Pokorný – 100-jara | 23 |
| Kun vi, Maria, kantas ni | 24 |


## Redaktoraj vortoj

Kara leganto, kun ĝojo mi konstatas ke la nuna revuo estas densa, kaj tekste kaj enhave. La artikoloj estas plurdimensie pensigaj. Ili temas i.a. pri la klimato kaj nia respondeco gardi nian planedon, kiu estos nia kongresa temo ĉi-somere. Alia pensiga kaj admonega artikolo estas la “Ne estu indiferentaj”-parolo en Aŭŝvico je la 75a datreveno de la liberigo.

Krome vi trovas interesan predikon pri Loto kaj lia edzino; enkonduko al la temo de la preĝosemajno, kiu ĵus okazis, kaj kiun certe multaj el vi partoprenis en viaj eklezioj; intervjuo kun nia plej aĝa (?) KELI-ano k.t.p.

Vi trovos ankaŭ liston de aliĝintoj al la somera kongreso en Legnica. Kun granda ĝojo mi povas publikigi liston kun pli ol 50 personoj.

Ne hezitu sendi al mi materialon, kiun vi volas ke aliaj legantoj povu legi en nia revuo. Finfine mi deziras al vi bonan legadon. ❧

# Klimato kaj teologio

Philippe Cousson, FR

Unu el la sloganoj de la Reformacio, unu el la kvin "sola" estas: Soli Deo gloria, nur al Dio la gloro. Sed la ĉefaj motivoj de la nuna generacio estas aŭ "la gloro al la homo kaj al la teknikaj atingoj kaj eblecoj", aŭ inverse "gloro al la Naturo". Kiam oni legas la du unuajn ĉapitrojn de Genezo, oni vidas ke ambaŭ estas malĝustaj. Genezo 1,28 montras ke la Naturo ne devas esti nova idolo, al kiu oni submetiĝu. Kaj Genezo 2,15 indikas ke la homo ne devas detrui la Naturon sed gardi ĝin, ĉar la homo ne estas la nova mastro de ĝi. Kalvino indikis ke la homo ne estas la proprietulo de la Naturo, ĉar li devas fari "uzon sobran kaj moderan".

Sed, la agado de la homo estas ankaŭ kondukata de la peko, kiu atingas ĉiujn. Kaj estas konstatebla la rubaĵo de la homa orgojlo.

Tio videblas tra multaj aspektoj: la klimata ŝanĝiĝo definitive ĉefe ŝuldata al la homa agado, la malapero de multaj bestaj kaj plantaj specioj, same ŝuldata al la homa agado, la polucio de la maroj kaj oceanoj, de la grundoj kaj de la atmosfero. Konstateblas ankaŭ la iom-postioma reduktiĝo ĝis baldaŭa malapero de la naturaj provizaĵoj. Averto pri tiu danĝera situacio faris jam la Klubo de Romo en 1972.

Kiam oni parolas pri krizo, oni ne forgesu la etimologion de la vorto. Tio estas la greka krisis (κρίσις), kiu indikas ankaŭ momenton de prijuĝo, de ekkono, sekve de decido. Estas nun la tempo por la homaro decidi kiun estontecon ĝi volas por si mem kaj por siaj posteuloj. En tiuj decidoj, oni devas ankaŭ kalkuli justecon, justecon inter riĉuloj kaj malriĉuloj, poluciatoj kaj poluciantoj, profitantoj kaj viktimoj. Ni bezonas liberiĝon, el la frenezo de la laboro kaj de la konsumo. Ni bezonas kompreni la signifon de la ripozo, de la ĉesado, de la sabato.

Ĉiuj homoj devas kunlabori en tiu strebo ĉesigi tiun kuron al kresko kiu estas detruiga. Ĉiuj homoj devas zorgi sianivele pri la biologia diverseco, kiu garantias inter aliaj aferoj ankaŭ nian nutradon. Estas ankaŭ necese konservi, starigi la socian justecon, tiun bezonatan solidarecon kun la ekonomiaj kaj ekologiaj viktimoj, sen kiu la homaro fariĝos barbararo.

Tiuj konsideroj povas aspekti malmulte teologiaj. Tamen, sen la espero kiun Dio lasas al ni per siaj promesoj, restas nur al la homaro la katastrofismo aŭ la blindeco. Jesuo diris al siaj disĉiploj: Vi estas la salo de la tero. Ĉu ni kristanoj lasos la teron putriĝi?

# Episkopa letero pri la klimato

Leif NORDENSTORM, SE

La episkopoj de la Sveda eklezio eldonis Episkopan leteron pri la klimato. Dio amas la mondon kaj volas ĝian saviĝon. Tial la svedekleziaj luteranaj episkopoj en 2019 eldonis la duan eldonon de *Ett biskopsbrev om klimatet*, kies kovrilon ornamas foto de la terglobo, fotita en spacoŝipo. La episkopoj konstatas ke la klimata ŝanĝiĝo verŝajne estas la plej granda defio, antaŭ kiu staras la homaro.

Ni scias ke la klimato de la planedo Tero dum kvar kaj duona miliardoj da jaroj ŝanĝiĝis plurfoje. La nuna ŝanĝiĝo tamen estas kaŭzita de aktivecoj de homoj. Pro tio oni komencis paroli pri nova erao: antropoceno[†]. Apud la klimata ŝanĝiĝo okazas alia katastrofo. La biologia varieco malkreskas, ĉar multaj zoologiaj specioj jam ekstermiĝis. Unu el la kialoj de tiu ĉi okazanta katastrofo estas ke la konsumado ĉiam kreskas. En kristana tradicio oni diris: ”*Ĉar kiel profitus homo, se li gajnus la tutan mondon kaj perdus sian animon?*” (Marko 8:36). Ni tamen tro ofte forgesas tion, kaj devos atenti tion denove.



Kial politikistoj ne tutkore okupiĝas pri la problemo? Unu el la problemoj estas konfliktoj pri disdivido de riĉaĵoj. Malpli riĉaj landoj ne volas haltigi la evoluiĝon kaj riĉaj landoj ne volas malriĉiĝi. Fosilia energio donas grandegajn ekonomiajn profitojn, kaj pro tio allogas kapitalon kaj homojn.

La episkopoj invitas ordinarajn kristanojn agi kontraŭ la klimata katastrofo. Ni komencu per malgrandaj paŝoj, ekzemple malŝaltante lampojn en ĉambroj, el kiuj ni foriras. Farinte tion ni kutimiĝas ankaŭ al aliaj pli grandaj ŝanĝiĝoj, ankaŭ tiaj pri kiuj devas decidi politikistoj. Samtempe ni devas atendi ke la ŝanĝiĝoj ne kaŭzas maljustecon en la socio.

La episkopa letero finiĝas per admonoj direktitaj al eklezioj, unuopuloj, deciduloj, kompanioj kaj organizaĵoj. Unu el la admonoj temas pri tio ke ni plifortigu la kontribuon de eklezioj kaj religioj al klimata justeco kaj klimata adaptiĝo. Alia admono temas pri tio ke ni devas atenti kion povas signifi spiritualismo en la estonteco. Tie ĉi temas pri spiritualismo difinita tiel ĉi: ”*Inklino ŝati, en la praktika vivo, la spiritajn bonojn super la materiaj*.” (Laŭ PIV.)

ઙ

† *Antropoceno* estas proponita geologia epoko. Ĝi havas neniun akceptitan limon sed kalkuliĝas de la industria revolucio de la malfrua 18-a jarcento ĝis la nuntempo. Ĝi povas esti difinita kiel la tempo, kiam la homa agado tutmonde influis la terajn klimatojn kaj ekosistemojn, inkluzive per monda varmiĝo. /Vikipedio

Represo el Espero Katolika 4-6/2015

# Laŭdata estu

## Pri la prizorgo de la komuna domo

### Encikliko de papo Francisko

Publikigita en Espero Katolika numero 4-6/2015

Tradukis/resumis Carlo Sarandrea, IT

La integra ekologio fariĝu nova paradigmo de justeco, ĉar la naturo ne estas simpla kadraĵo de la homa vivo: jen la kerno de la dua encikliko de papo Francisko "Laudato si'" (Laŭdata estu) pri la prizorgo de la komuna domo. La dokumento ĉerpas sian titolon el la preĝalvoko de sankta Francisko el Asizo entenata en la kantiko de la kreitaĵoj. La sesĉapitra encikliko kolektas, laŭ kolegieca vidpunkto, ankaŭ plurajn meditojn de la episkoparaj konferencoj de la mondo kaj finiĝas per du preĝoj, unu interreligia kaj unu kristana, por la savogardo de la kreaĵaro. Preskaŭ 200 paĝoj de teksto, inkluzive de notoj, enkonduko, ses ĉapitroj, du finaj preĝoj: ili estas la ciferoj de ĉi tiu encikliko, dokumento, kiun antaŭ ĝia oficiala apero kelkaj iom aŭdacaj komentistoj difinis "ekologiista manifesto". Ĝi, longe atendita, pritraktas la median temaron: al ĝi Francisko jam de la komenco de sia papado dediĉis multajn intervenojn, memorigante plurfoje laŭ la spuroj de siaj antaŭuloj la neceson esti 'gardantoj de la donacoj de Dio', inter kiuj estas la kreaĵaro. Ni publikigas resumon.

### Nia fratino Tero

"Laŭdata estu" kantis sankta Francisko el Asizo. Per tiu bela kantiko li memorigis al ni, ke nia komuna domo estas ankaŭ fratino, kun kiu ni kundividas la ekzistadon. Tiu ĉi fratino protestas pro la malbono, kiun ni kaŭzas al ŝi, pro nia senrespondeca uzo kaj pro nia trouzo de la bonoj, kiujn Dio metis en ŝin. Ni kreskis pensante, ke ni estis ŝiaj mastroj kaj regantoj, rajtigitaj prirŝteli ŝin. La detruo de la homa naturmedio estas io tre grava. Patriarko Bartolomeo aparte parolis pri la neceso, ke ĉiu pentu pri sia maniero mistrakti la planedon. Pri ĉi tio li plurfoje esprimis sin laŭ neŝancela kaj instiga maniero, invitante nin rekoni la pekojn kontraŭ la kreaĵaro. Ĉar "krimo kontraŭ la naturo estas krimo kontraŭ ni mem kaj peko kontraŭ Dio". "Mi opinias", skribas la Papo, "ke sankta Francisko estas la antonomazia ekzemplo de la zorgemo pri tio, kio estas malforta kaj de kompleta ekologio travivita kun ĝojo kaj aŭtentikeco. Li estas la sankta patrono de ĉiuj, kiuj studas kaj laboras en la sektoro de ekologio".

### Alvoko

La urĝa defio protekti nian komunan domon inkluzivas la zorgemon unuigi la tutan homan familion en la serĉo de eltenebla kaj tuteca evoluo, ĉar ni scias, ke la aferoj povas ŝanĝiĝi. La Papo listigas kelkajn pivotajn konceptojn tra la tuta encikliko, ekzemple: la strikta rilato inter malriĉuloj kaj la malforteco de la planedo; la konvinko, ke ĉio en la mondo estas intime kunligita; la invito serĉi aliajn manierojn koncepti ekonomion; la grava respondeco de la internacia politiko; la kulturo de la forĵeto kaj

la propono de nova vivostilo. Ekzistas formoj de poluciado, kiuj ĉiutage trafas la personojn. Al tio aldoniĝas la poluciado estigita de la rubaĵoj. La tero, nia domo, skribas la Papo, ŝajne pli kaj pli transformiĝas en senmezuran deponejon de rubaĵoj.

## Pura akvo por ĉiuj

La klimato estas komuna bono de ĉiuj kaj por ĉiuj. La trinkebla kaj pura akvo estas problemo el unuaranga graveco, ĉar ĝi estas nemalhavebla por la homa vivo kaj por subteni la terajn kaj marajn ekologiajn sistemojn. Por la homoj la aliro al trinkebla kaj sekura akvo estas esenca homa rajto. Ĉi tiu mondo havas gravan socialan ŝuldon rilate al la malriĉuloj, kiuj ne povas aliri trinkeblan akvon. Francisko mencias interalie la "pulmojn" de la planedo, plenajn je biodiverseco: Amazonio, la rivera baseno de Kongo aŭ la grandaj akvoriĉaj stratumoj kaj la glaciejoj. Vere estas aŭtentika "ekologia ŝuldo", ĉefe inter nordo kaj sudo, kunligita kun komercaj misekvilibroj, kiuj influas sur la ekologia sistemo. La problemo estas la manko de la nepra kulturo por alfronti ĉi tiun krizon kaj necesas gvidantoj kiuj indiku la vojon. Rimarkindas, ĉi-koncerne, la malforta reago de la internacia politiko. La submetiĝo de politiko je teknologio kaj financo montriĝas dum la malsukcesoj de la mondaj pintaj kunvenoj pri la naturmedio. Intertempe ekonomiaj povoj daŭre pravigas la nunan mondan sistemon, en kiu unuarangas spekulado kaj serĉo de financaj rentumoj.

## Gardi la Teron

"Ni ne estas Dio. La tero antaŭas nin kaj estis donita al ni. Gravas legi la bibliajn tekstojn en ilia kunteksto kaj memori, ke ili invitas nin kultivi kaj gardi la ĝardenon de la mondo. "Kultivi" signifas plugi aŭ prilabori grundon; "gardi" signifas protekti, prizorgi, konservi, vigli. La sciencoj aplikitaj al la teknologio, bone orientitaj, kapablas ne nur produkti vere valorajn aĵojn por plibonigi la vivokvaliton de la homa estulo, ekde la objektoj uzataj hejme ĝis la grandaj transportiloj. Tamen ni ne povas ignori, ke la atoma energio, la bioteknologio, informadiko, la kono de nia DNA mem kaj la aliaj potenckapabloj, kiujn ni atingis, proponas teruran povon.

## Ĉiutaga ekologio

La Papo poste parolas pri ekologio en la ĉiutageco. Necesas, li memorigas, prizorgi la publikajn spacojn. La manko de loĝejoj estas grava en multaj mondopartoj. La vivokvalito en la urboj estas sufiĉe kunligita kun la transportiloj, kiuj estigas ofte grandajn penojn ĉe la loĝantoj. En la urboj veturas multaj aŭtomobiloj uzataj de unu aŭ du personoj, pro tio la trafiko fariĝas intensa, kreskas polucio, oni konsumas senmezurajn kvantojn da nerenovigebla energio kaj fariĝas necesa la konstruo de pliaj stratoj kaj parkejoj, kiuj damaĝas la urban tutaĵon. Multaj fakuloj samopinias pri la neceso doni prioritaton al publikaj transportiloj. La katastrofajn prognozojn oni ne plu povas konsideri kun malŝato kaj ironio.

## Agadlinioj

La teksto de la encikliko daŭras per pritrakto de agadlinioj. Por la malriĉaj landoj, oni legas, prioritataj devas esti la elradikigo de mizero kaj la sociala evoluo de iliaj loĝantoj; samtempe, ili devas atenti la skandalan egan konsumadon fare de kelkaj privilegiaj sektoroj de sia loĝantaro kaj pli bone batali kontraŭ koruptado. En ĉiu diskuto pri entre-

prenista iniciato oni devus levi serion da demandoj por povi distingi, ĉu ĝi kondukos al vera integra evoluo: Kiucele? Kial? Kie? Kiam? Kiamaniere? Al kiu ĝi estas alcelita? Kiuj riskoj estas? Je kiu prezo? Kiu pagas la elspezon kaj kiel li povos fari tion? La principo de la maksimumigo de profitoj estas koncepta distordo de ekonomio. Kaj kiu estas la rolo de politiko? Ni bezonas politikon, kiu rezonu laŭ vasta vido, kiu akcelu novan tutecan aliron al temoj kaj problemoj, inkluzivante en interfaka dialogo la diversajn aspektojn de la krizo.

### Ŝanĝi vivostilon

Alia agadlinio estas la ŝanĝo de vivostiloj: ĝi povus ekzerci sanan premon sur tiuj, kiuj havas la politikan, ekonomian kaj socian povon. Tio okazas kiam la movadoj de konsumantoj sukcesas ĉesigi la aĉetadon de specifaj produktoj. La eduko al naturmedia respondeco povas kuraĝigi diversajn sintenojn, kiuj rekte kaj grave influas sur la prizorgo de la naturmedio, kiel la neuzadon de plastikaĵoj aŭ de papero, la malkreskon de akvo-konsumado, la diferencigon de la rubaĵoj, la kuiradon nur de tio, kion oni efektive konsumas, la zorgemon rilate al aliaj vivantuloj, uzi publikan transportadon aŭ kune uzi la saman veturilon, planti arbojn, malŝalti senutilajn lumojn. Oni ne devas pensi, ke ĉi tiuj klopodoj ne sukcesos ŝanĝi la mondon. La ekologia krizo estas alvoko al profunda interna konvertiĝo. Sobreco, praktikata kun libereco kaj ekkonscio, estas liberiga: ĝi ne estas "malpli da vivo" nek "vivo kun malalta intenseco", sed tute la malo.

Oni povas bezoni malmulton kaj vivi multe.

Represo el Dia Regno 3/1990

# Homa respondeco?

## Prelego dum kongreso en Annan Court 1989

Publikigita en Dia Regno 1990

Mervyn Jackson (1939 – 1996), UK

Dum ĉi tiu kongreso (Annan Court), ni unue diskutis pri justeco, dia kaj homa!, pri paco kaj ŜALOM. Mia temo estas la homa respondeco, kaj pritraktas tiun temon sciencisto, geografo, fakulo pri atmosfero kaj tero. Mi faros ĉi tion alimaniere ol la aliaj prelegintoj. Mi intencas prezenti kelkajn problemojn de la natura mondo science, laŭ scienca aspekto, ne abstrakte. Tio ne signifas ke mi ne havas intereson en la ege malbona stato de multaj milionoj da homoj en la tiel nomata "Tria Mondo".

Sed mi povos helpi vin pli, se mi parolos ĉefe pri sciencaj aspektoj de ekologio, de la naturo, sed ne estas la momento diskuti, ĉu ni konservu vespojn aŭ ne.

Mi provos klarigi la vitrodoman efikon,

la truojn en la ozon-tavolo, la fumon kaj acidajn pluvojn, la nuklean vintron, la plumbon kaj kemiaĵojn kiuj venenigas nin...

En junio 1989 okazis la elektoj al la parlamento de la Eŭropa Komunumo, la ”Komuna Merkato”. Kaj en kelkaj landoj estis multaj homoj kiuj voĉdonis por la Verdaj partioj, ne verdaj pro Esperanto sed verdaj pro naturo, ekologio. Ili ne scias tiom pri scienco, sed ili volas indiki, ke ili estas malkontentaj pri la evoluo de la homa respondeco pri nia planedo, Tero.

> *Kaj Dio kreis la homon laŭ Sia bildo, laŭ la bildo de Dio Li kreis lin; en formo de viro kaj virino Li kreis ilin. Kaj Dio benis ilin, kaj Dio diris al ili: fruktu kaj multiĝu, kaj plenigu la teron kaj submetu ĝin al vi, kaj regu super la fiŝoj de la maro kaj super la birdoj de la ĉielo, kaj super ĉiuj bestoj, kiuj moviĝas sur la tero.*
>
> *Kaj Dio diris: Jen Mi donis al vi ĉiujn herbojn, kiuj semas semon, kiuj troviĝas sur la tuta tero, kaj ĉiujn arbojn, kiuj havas en si arban frukton, kiu semas semon; tio estu por vi manĝaĵo. Kaj al ĉiuj bestoj de la tero kaj al ĉiuj birdoj de la ĉielo kaj al ĉiuj rampaĵoj sur la tero, kiuj havas en si vivan animon, la tutan verdan herbaĵon kiel manĝaĵon. Kaj fariĝis tiel. Kaj Dio rigardis ĉion, kion Li kreis, kaj vidis, ke ĝi estas tre bona. Kaj estis vespero, kaj estis mateno, la sesa tago.* Genezo 1,27-31

Ankaŭ ni, kristanoj, estas malfeliĉaj pro la evoluo de la mondo. Per televido, radio, ĵurnaloj, ktp. ni aŭdas multon pri la planedo, kaj la malbona situacio.

Oni diras, ke nia konduto kondukas al malbona, malfeliĉa, eĉ danĝera 21a jarcento, la jarcento de niaj geinfanoj kaj genepoj.

Ni bone fiksu la kadron: la tero plejofte estas je malpli ol 3 km super la marnivelo, la atmosfero plejmulte malpli ol 15 km (90 %). Kaj tie ĉi loĝas vi sur la surfaco de la tero. Sed vi spiras la aeron, kaj ŝatas la sunbrilon, eĉ ĝojas kongresi, promeni kaj naĝi en la sunbrilo.

## Atmosfero

Ĝi enhavas nitrogenon (N, 78 %), iom da oksigeno (O, 21 %, kiun ni vivantaj estaĵoj foruzas kiam ni spiras) kaj iom da karbon-dioksido (kiun la plantoj kaj arboj ankaŭ foruzas, kaj transformas al oksigeno), iomete da akva vaporo, da argono. Krom tiuj gasoj, estas malgrandaj kvantoj de multaj aliaj gasoj, por ne paroli pri la diversaj polvoj.

Super la atmosfero brilas la suno (ĉiam) kaj multo el la radiado trapasas la atmosferon al la tero kaj al la maro. La atmosfero reflektas la ceteron de la suna radiado al la kosmo. Same faras la tero kaj la maro kaj el tiu reflekto la atmosfero lasas trapasi parton, sed ĝi denove resendas la ceteron al la tero, des pli ju pli da karbon-dioksido estas en la aero. Tiun efikon ni nomas ”vitrodoma efiko” aŭ ”forceja procezo”.

Dum la jardekoj 20 kaj 30 de ĉi tiu jarcento la temperaturo de la mondo varmiĝis pli ol antaŭe en la 19-a jarcento. Pro tio sciencistoj en la jardeko 40 timis, ke la pliiĝo de la karbon-dioksido en la atmosfero altigus la temperaturon per la vitrodoma efiko. Sed dum la jardekoj 50, 60 kaj 70, la temperaturo de la mondo denove falis, kaj oni forgesis la timon pri varmeco kaj diskutis aliflanke la venontan glaci-epokon.

Tamen dum la lastaj kelkaj jaroj, temperaturoj denove plialtiĝis, kaj denove oni timas, ke estas pli da karbon-dioksido, kiu plialtigus la temperaturon de la mondo. Kaj nun tiu timo ricevas grand-

egan aŭdadon. Sed fakte, ni sciencistoj ne povas esti certaj ĝis post aliaj 10 jaroj, ĉu la temperaturo daŭre plialtiĝos aŭ denove malplialtiĝos.

Oni ne timas la pli varman veteron, sed la konsekvencojn: fandiĝo de neĝo kaj glacio apud la polusoj kaj pli altaj marniveloj (denove la diluvo ?). Mi emfazas, ke homoj enspiras oksigenon kaj elspiras karbondioksidon, sed plantoj kaj arboj enprenas karbondioksidon kaj elĵetas oksigenon. Do se estas malpli da arboj sur la tero, oni atendas pli da karbon-dioksido en la maro kaj la atmosfero. Parte pro tio dum la kongresa semajno, la brita registaro anoncis planojn planti kelkajn grandajn ”komunajn” arbarojn apud la urbegoj de Britio, ekz-e London, Birmingham, Nottingham.

## Ozono

Alia afero estas la timo, ke ni perdas ozonon el la alta atmosfero. La radiado de la suno venas kun ĉiuj ondlongecoj, interalie tra mallongaj (kurtaj). Tre mallongaj radiadoj estas danĝeraj por la vivo de la naturo. Feliĉe protektas nin kontraŭ la danĝero iom da ozono kiu troviĝas 20-30 km-ojn super la tero : la t.n. ”ozon-tavolo”.

Oni nun trovas ke la klorofluorokarbonidoj (KFK, aŭ CFC) povas ŝanĝi ozonon en ordinaran oksigenon. Do kompreneble homoj subite timas, ke homoj mem difektas la ozonon, kiu protektas nin de la danĝerajradiadoj de la suno. Oni trovis ”truojn” en la ozontavolo ĉe la suda poluso, kaj la KFK-oj troviĝas en multaj aerosoloj, fridujoj. Sed bonorde la registaroj de la industriaj nacioj ĵus decidis produkti malpli danĝerajn kvazaŭ-KFK-ojn.

## Fumo

El industrio aŭ el ordinaraj domoj, fumo pliacidigas la atmosferon, kaj konsekvence la atmosferan akvon, kiu falas pluve. Multo el la acido devenas de la sulfur-dioksido. Sed, notu ke multo de la tero estas nature acida, antaŭ ol falas iu ajn pluvo. Do multe da akvo estas normale acida sen la interveno de la homo. Ankaŭ multaj plantoj ŝatas acidan grundon, ekz-e rododendroj. Sed aliflanke multaj plantoj ne tro ŝatas, kaj oni opinias, ke multaj arboj en Eŭropo malsaniĝas nun pro tro acidaj grundo kaj pluvakvo.

Ankaŭ la sulfur-dioksido de industrio kaj domoj povas ŝanĝi ordinaran nebulon en danĝeran nebulon (smog) por la homoj, kaj eĉ por la konstruaĵoj. Oni vidas en multaj eŭropaj urboj, ke la malnovaj konstruaĵoj difektiĝis pro la danĝeraj nebuloj dum la ĵus pasintaj jardekoj, pli ol dum la pasintaj jarcentoj.

Ankaŭ fumoj malheligas la sunon, kaj grizigas la bluan ĉielon. Pli frue en la semajno, la ĉiela koloro tie ĉi estis sufiĉe griza eĉ dum sunbrilo, tio estis pro la nebulo kiu venis el la kontinento per orientaj ventoj, kaj nun la okcidentaj ventoj forsendas nian britan fumon al la kontinento.

Pri la plumbo en benzino, mi opinias ke la timo de la homoj ŝanĝis la sintenon kontraŭ la kunplumba benzino.

## Nukleaj problemoj

Oni ankaŭ multe diskutas nun la efikon de la ”nuklea vintro” al la mondo. Oni nun opinias, ke nur malgranda nuklea milito kaŭzus morton al multaj plantoj, bestoj kaj konsekvence al homoj. La

malgranda akcidento en Ĉernobil (Ukrainio) estas laŭ mi ege valora evento. Ĉar ĝi efikis en multaj landoj dum pli ol unu jaro. Ĝi ne nur efikis en Ukrainio, aŭ en Sovetio, sed ankaŭ en la tuta Skandinavio, en Germanio, en Mediteraneo, kaj fine en la tuta norda hemisfero. Ĝi montris, ke en la atmosfero estas neniu landlimo, sed ke ni loĝas en unu mondo.

Oni multe cerbumis pri la ege grandaj militelspezoj de la mondo, kiuj daŭre kreskas. Nur malgranda nuklea milito aŭ teroristoj kiuj forŝtelus nuklean armilon povus kaŭzi malvarman, malhelan vintron en la mondo. Ĝi daŭrus dum jaroj, kaj detruus ekologiajn sistemojn kaj donus al la postvivantaj homoj, se ili povus postvivi, ruinigitan planedon, kiu multe malsimilus la nunan.

Konsekvence multaj homoj malŝatas la nuklean energion. Sciencistoj ĝenerale opinias, ke ĝi estas tre utila, sed multaj homoj timas la adjektivon ”nuklea” aŭ ”atoma”, kaj timas la radiantajn restaĵojn de la nuklea industrio, kiuj estas tre malfacile kaŝeblaj.

Restas ankoraŭ multaj aliaj aferoj, kiujn mi eĉ ne menciis ĝis nun. Ili estas gravaj, sed ĝenerale nur en certaj lokoj. Ekzemple la perdo de bona grundo pro inundoj aŭ pro la gajno de la dezerto. La kemiaĵoj, kiujn industrio ofte metas en la atmosferon aŭ en la riverojn, ĉu intence, ĉu akcidente, ekz-e en la Rejnon.

Kion timi? La varmon de la tero pro la vitrodoma efiko, la pliajn kancerojn pro la malapero de ozono, la perdon de la arboj pro la acidaj pluvoj, la nukleajn armilojn aŭ industrion? Kion fari? Kaj en la sama momento, homoj el aliaj landoj simple mortas pro malsato. Kie zorgi?

# Loto kaj lia edzino instruas nin

Prediko la 1an de januaro 1996

József FARKAS (1914-1999)

Tradukis Ágnes Ráczkevy-Eötvös, HU

Karaj gefratoj, laŭ mi estas kompreneble, ke kiam mi parolas pri tiuj ĉi versikloj en Genezo (vidu apudan paĝon), ricevas gravan signifon la edzino de Loto. Estas malsaĝa tiu homo, kiu tiel alproksimiĝas al tiu ĉi historio, ke ‘jen, tiaj estas la virinoj! Ili rigardas malantaŭen, fariĝas kolono el salo, ne estas en la sama nivelo kun Loto’. Estus maldigna pensado de moderne pensanta homo. Ekde kiam Jung faris sian servon, ĉiuj kleraj homoj estus devinta scii, ke du tipoj de animoj estas en ni.

Ne tiel estas, ke la virinoj estas entute nur ‘virinoj’, kaj la viroj estas entute nur

‘viroj’! Jung uzas tiujn ĉi du vortojn: la *animus* kaj la *anima*, kaj ambaŭ estas kaj en viroj kaj en virinoj. Estas bone, se la viro estas vira kaj forta, sed li ne rajtas subpremi la virinan elementon en si, la *anima*. Kaj inverse: estas bone, se la virino estas virina, sed estas malbone, se la virino subpremas la viran elementon, la *animus* en si mem.

Tio estas la honesta pensado pri tiu ĉi temo, se mi kredas, ke mi en unu persono estas kaj Loto kaj la edzino de Loto. Same, kiel mi en unu persono estas samtempe kaj Kain kaj Abel. Aŭ en la Nova Testamento samtempe mi estas kaj Maria kaj Marta. Tiuj bibliaj personoj personigas unu-unu *animan* elementon, kaj ili ĉiuj estas en mi. Estas legio en ni. Troviĝas en ni kaj elementoj kiuj venas el malbono kaj elementoj kiuj estas Diaj.

Tiam ni pensadas bone, se ni honeste konfesas, ke kaj la Loto-elemento en ni faras sian taskon, kaj la Loto-edzina-elemento hantas en ni – ke ni simile vivas, kiel la edzino de Loto vivis kaj kiu faliĝis en tiu ĉi provo de savado.

Ĉar pri tio temas tiu ĉi historio: antaŭ Dio punis tiujn ĉi du urbojn, Liaj anĝeloj savis tiujn homojn, kiuj per la indulgo de Dio ricevis esceptan savadon kompare kun aliaj. Kiam ni parolas pri tiu ĉi historio, ni ne forgesu, ke ni estas en la Malnova Testamento, ja estas malnov-testamenta pensmaniero kaj estas malnov-testamentaj kategorioj. Tio ne ĝenu nin, ĉar ankaŭ en tiuj malnov-testamentaj elementoj estas multaj eternaj verecoj kaj nov-testamentaj elementoj.

Do en tiu ĉi historio la esenco estas la savado de la edzino de Loto, la savado de *animus* kaj *anima*. Grava trajto de la *animus* estas la moviĝemo, kaj de la *anima* estas la stabileco. La karakterizo de la *anima* estas la ĉirkaŭbrakanta amo, la konservado, fari neston, gardi la varmon de la nesto, kaj fari ordon. La karakterizo de la *animus* estas la ĉasado. Antaŭ jarcentoj, jarmiloj elformiĝis tiu ĉi labor-partigado, kiu ankaŭ hodiaŭ estas iel en la genoj, sed kune. Tiuj du partoj ĝenerale estas en konflikto unu kontraŭ la alia, kaj ne estas facile trovi la ekvilibron en tiu ĉi batalo.


Ni scias, kio okazis: Dio avertis Abrahamon, ke Li punos Sodomon kaj Gomoron pro iliaj pekoj. Sekvis grandioza preĝbatalo: se ekzistas kvindek virtuloj? Kaj marĉandado: kvardek kvin, kvardek, tridek, dudek, dek? Sed Abrahamo ne trovis dek virtulojn. Sekvis la juĝdecido. Pro la amo de Dio tamen devis savi tiun unu nuran familion – Loton, la edzinon de

*Kiam leviĝis la matenruĝo, la anĝeloj rapidigis Loton, dirante: Leviĝu, prenu vian edzinon kaj ambaŭ viajn filinojn, kiuj ĉi tie troviĝas, por ke vi ne pereu pro la krimeco de la urbo. Sed ĉar li malrapidis, tial la viroj kaptis lian manon kaj la manon de lia edzino kaj la manojn de liaj du filinoj, pro kompato de la Eternulo al li, kaj ili elirigis lin kaj metis lin ekster la urbon. Kaj kiam ili elkondukis lin eksteren, ili diris al li: Savu vin pro via animo; ne rigardu malantaŭen kaj haltu nenie en la tuta ĉirkaŭaĵo; sur la monton savu vin, por ke vi ne pereu. ... Kaj lia edzino ekrigardis malantaŭen, kaj ŝi fariĝis kolono el salo.* Genezo 19,15-26

Loto, iliajn du filinojn, kaj la fianĉojn de la filinoj. Ili ankoraŭ ne geedziĝis, do la fianĉoj aparte vivis, kaj Loto estis tiel humana, ke li kuris al la fianĉoj, avertis ilin pri la alproksimiĝanta katastrofo, ke ili eskapu. Sed ili ne kredis, nur ridis pri Loto, do la du fianĉoj restis.

Alvenis la mateno, kaj ili ne volis ekiri. Ili komprenis, ili akceptis, ili kredis – sed ne volis foriri. Ili pakadis, ili ordigis siajn aĵojn, sed ne ekiris. Fine, laŭ la Biblio, ekzakte perforteme agis la anĝeloj, ili kaptis la manojn de Loto kaj de la famili-anoj kaj eltiris ilin el la domo ĉar ili ne volis aŭ ne povis ekiri kaj Dio kompatis ilin.

Ekde nun la historion mi interpretas kiel simbolan historion, kaj la enhavantajn bildojn mi klopodos traduki al la vortoj de la anima vivo, de la spirita vivo. El tiu, kiun mi ĝis nun diris, tiu elbrilas, ke en la savado de la homo estas multe pli grava la perforto de Dio, ol la klopodo de la homo. Tio estas tre grava! Dio perforteme kunportas min al Sia lando – ne pro mia klopodo mi eniras en la



Loto kaj lia familo fuĝas el Sodomo. Laŭ G. Doré

landon de Dio. Almenaŭ la historio de Loto tion montras: ili komprenis, ili akceptis la averton, ili tenis ĝin prave, sed ili ne movis. Bezonis iu tipo de perforto, ke ili eliru.

Kaj poste, kiam ili estis ekster la urbo – ankaŭ tio estas rimarkinda – la anĝelo lasis ilin solaj. Ili komencis diskuti, kien ili iru, fine la anĝelo permesis, ke ili iru al iu pli proksima urbeto, tien ili fuĝis.

Dum tiu ĉi fuĝado okazis la tragedio. Kvar ordonojn la anĝelo donis al ili. La unua ordono: savu vian vivon, la dua: ne rigardu malantaŭen, la tria: nenie haltu en la ĉirkaŭaĵo, la kvara: fuĝu al la monto! Ili iris, kaj okazis la tragedio.

En la hebrea teksto laŭvorte tion ni legas: La edzino, kiu iris malantaŭ li, rigardis malantaŭen. Multon diras tiu „iris malantaŭ”. Ili ne kovris sin en arbusto, ili ne iris mano en mano, ili aliel iris, kaj la edzino postrestis, kaj fariĝis kolono el salo.

Mita rakonto. Ni ne serĉu, kio estas la historia vero, kio vere okazis. Estas eterna vereco en tiu ĉi rakonto, ne historia vereco. Se estas historia la vereco – tiam nur unufoje okazis. Se estas eterna, la vereco – tiam, kaj kun vi kaj kun mi denove kaj denove povas okazi. Ni ne blokiĝu je la kolono el salo, ne tion vidu, ke la edzino tie mortis, pro iu spasmo aŭ pro iu alia kaŭzo.

Tiu ĉi estas la historio de la edzino de Loto, kaj nun mi en sep punktoj sumigas la instruon de tiu ĉi historio.

La unuan instruon mi tiel diras: Dio elprenas nin el la urbo de peko, eĉ perforte eltiras nin, sed ne enportas nin perforte en Sian ĉielan landon. La perforto ĝenerale estas malbela agado, ankaŭ Dio ne ŝatas ĝin. Se Dio tamen devas ion perforte fari, tiam Li tion faras ĝis kiam elkunportinte la

homon li poste povas diri: nun komenciĝas via laboro. La eniro estas via tasko, la eliro estis mia tasko. Same kiel el Egipto per grandioza forto Li elprenis la popolon, sed eniri jam la popolo mem devis. Kaj tio ne estis facila.

Ŝajnas al mi, ke tio estas universala vereco. Eĉ perforte Dio elkunportas min el mia peka mondo, el mia interna Sodomo. Elprenas, se devas per kruela perforto, per batoj kiuj multe doloras, per perdoj, per humiligo – sed ne enkunportas min perforte. Tio estas la unua grava instruo de tiu ĉi historio.

La duan instruon mi tiel diras: Loto gajnis, ricevis kompaton/indulgon, sed tra incendio. Li gajnis indulgon, sed ĉiuj liaj havaĵoj, kiujn li havis en la malnova mondo, perdiĝis. Li saviĝis tra fajro. Dio diras, ke eblas komenci novan vivon, kio ajn okazis antaŭe, sed en fajro bruliĝas ĉio, kio estis antaŭe kaj ni preskaŭ nude devas komenci la novan vivon. Kiel Paŭlo diras: *Sed kio estis al mi gajno, tion mi rigardis kiel malgajnon pro Kristo* (Filipianoj 3,7). Tiu ĉi estas la dua instruo, ke ekzistas indulgo, ni povas ricevi kompaton, sed ĉi tiel, tra aŭ farite de fajro.

La trian verecon mi tiel diras, ke ĝi estas la vereco de 'preskaŭ'. Preskaŭ!

Ni pensu pri la nov-testamenta ekzemplo de la riĉa junulo, kiu demandis Jesuon, kiel eblas saviĝi, kaj kiam li diras, ke li ĉion faras, kion la leĝo diras, Jesuo diras al li: *Vi ne estas malproksime de la regno de Dio* (Marko, 12,34). Vi preskaŭ estas tie. Vi alvenis al la sojlo, sed ŝajnas, ke eniri vi jam ne povas, ĉar via havaĵo ne permesas. Preskaŭ vi saviĝas. Ankaŭ Loto preskaŭ pereis kune kun Sodomo, li estus pereinta, se Dio ne kompatus lin. La edzino preskaŭ travivis, se ŝi estus povinta ne malantaŭen rigardi.

Estas tre aktuala la demando nun, kiam venas nova jaro. Ĉu ni povas ne rigardi malantaŭen? Tio ne signifas, ke ni artefarite nuligu ion el nia memoro, tio signifas, ke ni ne permesas, ke la estinteco fariĝu forto kaj baru nin fari novajn paŝojn en la nova jaro. Preskaŭ. La edzino de Loto preskaŭ liberiĝis, sed ĉar ŝi ne povis ne rigardi malantaŭen, fine malvalidiĝis, ŝi mem malvalidigis la indulgan amon de Dio.

La kvaran instruon mi tiel diras, ke Dio savis Loton, ankaŭ la edzino de Loto eliris, sed ŝia koro restis tie, en Sodomo. Tio denove estas iu interesa ebleco: eblas, ke mi vivas en Babilono, en la adulta urbo, sed mia koro ne estas ligita tien. Kaj jen, estas la inversa ekzemplo: eblas, ke miaj piedoj elkunportis min el Sodomo, sed mi lasis mian koron tie. Kie estas mia koro? – tio estas la esenco. Ne gravas, kien iras miaj piedoj. Vi trankvile rajtas iri al Babilono, se via koro estas ĉe Dio, kiel diras la letero al la Hebreoj.

La kvina vereco tiel sonas: kiom Dio faris en la vivo de la edzino de Loto, tiom okazis. Kion jam la edzino de Loto estus devinta fari – tio ne okazis. Troviĝas religiemaj homoj, en kies vivo Dio multon faris, ili eĉ povus fanfaroni, ke: Dio savis min, Dio pardonis miajn ŝuldojn, Dio lumis al mi lumon. Kion Dio devis fari, tion Li faris, sed kion la edzino estus devinta fari, tion ŝi jam ne faris.

Kontraŭ la kutima protestanta rigideco, unuflankeco ni diru honeste, ke tiel estas la vojo de la savado, ke ankaŭ Dio faras, kion

Li devas fari, kaj ankaŭ la homo faras, kion la homo devas fari. Kutime la protestantoj diras, ke '*Dio faras ĉion* kaj la homo saviĝas', kaj la katolikoj diras, ke '*la pia homo devas fari ĉion*, por ke li saviĝu'. Ambaŭ opinioj estas eraraj: Dio faras ĉion kaj poste diras, ke '*nun vi, homo devas daŭrigi*'. Laŭ mia opinio, tio estas la biblia pensado pri la savado. La edzino de Loto tiel eraris, ke ŝi permesis, ke Dio perforteme elkunportis ŝin el Sodomo, sed kiam jam ŝi mem estus devinta ekiri, tiam ŝi rigardis malantaŭen.

Kiel sesa penso mi aparte parolas pri tiu ĉi malgranda detalo de la historio, ke ŝi postrestis malantaŭ la aliaj kaj rigardis malantaŭen. Ŝi ne estis kune kun la aliaj familianoj. Tio estis granda malbono, ke ŝi postrestis. Se ili estus irintaj kune, se ili estus tenintaj la manon unu de la alia, eble Loto dirus al ŝi, venu, ne turnadu, ne rigardu malantaŭen! Kaj li estus tirinta la edzinon eĉ perforte. Sed ŝi postrestis, kaj tiel, fore de la edzo kaj la filinoj, tiel ŝi havis pli liberan eblecon rigardi malantaŭen.

Estas gravega averto: en la savado ni ne unik-adu! La savadon ne eblas individue fari, individue nur postresti eblas kaj malantaŭen rigardi. Kune, mano en mano, se iu malfortiĝas, rigardas malantaŭen, ĉar ne povas forgesi, kion forlasis, kion perdis, tiam ni iru mano en mano, kune. Doloras al vi la ideo, mi scias, sed ni iru kune! Danĝera afero eliri el la societo de la kredantoj. Sola ne sukcesos, ankaŭ tiam ne sukcesas, se Dio faras ĉion. Tio estas la Dia ordo, ke Li volas savi multajn homojn, Li volas savi ĉiujn, sed estas la tekniko de la ama savado de Dio, kaj tiu tekniko estas kuneco, mano en mano. Tion oni nomas komunumo, kiam ni iras mano en mano kaj ni atentas unu pri la alia, gardas unu la alian.

La nuntempa eklezia funkciado tute ne respegulas tiun ĉi biblian bildon, sed nun almenaŭ brilu antaŭ ni la bildo: mano en mano ni iru antaŭen! Simila al la edzino de Loto estas la tipa situacio de la kristanaj eklezioj: la dorso al la estonteco, la vizaĝo al la pasinteco. Ni havas belegan estintecon, eĉ ni rajtas fanfaroni pri tiu, sed ni devas iri, ni devas fuĝi antaŭen.

La sepa punkto, kiun mi legas en tiu ĉi historio, kaj eble proprajuĝe mi eltiras, sed kun forta konvinko mi demandas: kial la familio ne atentis pri la edzino, pri la patrino? Kial ili ne rimarkis, ke ŝi postrestis? Kial ili ne haltis, por ke ŝi povu (kur)atingi ilin? Kial ili permesis, ke la distanco inter ili kreskis kaj ŝi postrestis? Kulpas la edzino de Loto: la perditaj tapiŝoj, valoraĵoj, domo, banĉambroj, ĉar ili estas riĉaj homoj. La doloro pro la perdo de tiuj multaj aĵoj estas ŝia kulpo, sed kulpas ankaŭ Loto kaj la filinoj: kial ili ne tenis la manon kaj ne kuraĝigis ŝin kaj kial permesis ke ŝi postrestu?

Tiuj kaj multaj aliaj veroj estas en tiu ĉi historio. La edzino de Loto – mi diras denove – estas en ni, estas parto de nia animo, la *anima*. Ankaŭ en ni estas nostalgio pri la estinteco, pri niaj havaĵoj, pri la stabileco, pri la varma nesto. Sed dank'al nia Sinjoro, estas en ni ankaŭ la elano de la *animus*, ke devas fuĝi, devas antaŭen rigardi, turniĝi al la estonteco – sed ne subpremi la *anima*!

La *animus* kaj la *anima* iru mano en mano al la direkto de la estonteco. Tio estas mirakla programo al la nova jaro. Dio helpu nin en tio. ☙

# La dekunua ordono: “Ne estu indiferentaj!”

## 75-a jariĝo de la liberigo de Aŭŝvico (Auschwitz) 27 januaro 2020

Parolado de la pola ĵurnalisto Marian Turski, PL
Elgermanigis Wolfgang Guenther, DE

Tre estimataj gekunvenintoj, geamikoj, mi estas unu el tiuj, kiuj ankoraŭ vivas kaj unu el la malmultaj, kiuj ĝis preskaŭ la lasta momento antaŭ la liberigo estis en ĉi tiu loko. Je la 18a januaro komenciĝis mia tiel nomata evakuado el la koncentrejo Aŭŝvico, kiu post ses kaj duona tagoj montriĝis por pli ol la duono de miaj kunkaptitoj kiel mortomarŝo. Ni estis kolono de 600 personoj.

Tre verŝajne mi ne ĝisvivos la venontan jariĝon. Tiel estas la homaj leĝoj. Pro tio pardonu min, ke en tio, kion mi diros, estas iom da emociado. Kion mi diros, mi antaŭ ĉio volas diri al mia filino kaj al mia nepino, kiun mi dankas, ke ŝi ĉeestas ĉi tie, kaj al mia nepo. Mi adresas la samaĝulojn de mia filino, de miaj genepoj, do la novan generacion, aparte la plej junan.

Kiam ekestis la milito, mi estis adoleskanto. Mia patro estis soldato kaj estis suferinta gravan pafvundon de la pulmo. Tio estis dramo por nia familio. Mia patrino devenis el la pola-litova-belorusa limregiono. Tie estis trapasintaj la armeoj, tien kaj reen, ili marodis, prirabis, perfortis, forbruligis vilaĝojn, por ke ne restu io por tiuj, kiuj venis post ili. Pro tio oni povas diri, ke mi aŭtentike sciis, kion signifas milito. Tamen ŝajnis al mi, kvankam estis pasintaj nur 20, 25 jaroj, ke ĝi estis tiom fora kiel la polaj insurekcioj en la 19-a jarcento aŭ la franca revolucio.

Kiam mi hodiaŭ renkontas gejunulojn, mi konsciiĝas, ke ili post 75 jaroj estas iom teditaj de ĉi temo: kaj de la milito kaj de la holokaŭsto, de la ŝoaho, de la genocido. Mi komprenas ilin. Pro tio mi promesas al vi, junaj homoj, ke mi ne parolos pri mia mizero. Mi ne rakontos al vi pri miaj travivaĵoj, pri miaj du mortomarŝoj, prí tio, kiel mi travivis la finon de la milito, kiam mi pezis 32 kilogramojn, rande de la plenelĉerpiĝo kaj de la vivo. Mi ne rakontos pri tio, kio estis la plej malbona, tio estas pri la tragedio esti apartigata de miaj plejproksimuloj, kiam vi post la selektado antaŭsentas, kio ilin atendas. Ne, pri tio mi ne parolos. Mi volas paroli kun la generacio de mia filino kaj la generacio de miaj genepoj, pri ili mem.

Mi vidas, ke inter vi sidas la aŭstra federacia prezidento Alexander Van der Bellen. Ĉu vi memoras, Sinjoro Prezidento, kiam vi gastigis min kaj la prezidion de la Internacia Komitato de Aŭŝvico kaj ni parolis pri la tiamaj tempoj? Iumomente vi uzis la formulon “Aŭŝvico ne falis el la ĉielo”. Oni povus diri, ke ĝi estis, kiel la poloj diras, memkomprenebla memkompreneblaĵo.

Klare, ĝi ne falis el la ĉielo. Ŝajne povus esti banala konstato, sed ĝi estas profunda kaj por la kompreno tre grava mensa koncizaĵo. Ni dum momento reiriu en niaj pensoj, nia imagopovo, en la fruajn 1930ajn

jarojn al Berlino. Ni troviĝas preskaŭ en la urbocentro. La kvartalo nomiĝas Bavara Kvartalo. Tri stacioj for de la Kurfürstendamm kaj de la Zoologia Ĝardeno. Tie, kie hodiaŭ estas metroa stacio, situas parko. Kaj iun tagon en la fruaj 1930-jaroj aperas sur la benkoj ŝildo: "Por judoj la sidado sur ĉi benkoj estas malpermesata". Oni povus diri: Tio estas malkonvena, nejusta, ne oŭkej, sed finfine ja estas proksime tiom da benkoj, oni ja povas sidigi sin aliloke, ne estas malfeliĉo.

Estis kvartalo, en kiu loĝis reprezentantoj de la germana intelekta elito juddevena, ankaŭ Albert Einstein, la nobelpremiito Nelly Sachs kaj la industriulo, politikisto kaj ministro pri eksteraj rilatoj, Walter Rathenau. Poste aperis en la naĝejo la ŝildo: "Por judoj la eniro al la naĝejo estas malpermesata". Oni denove povus diri: tio ne estas agrabla, sed Berlino havas tiom da lokoj, je kiuj oni povas sin bani, tiom da lagoj, kanaloj, preskaŭ kiel en Venecio, oni do povas iri al alia loko.

Samtempe aperas ie la ŝildo "Por judoj la membreco en germanaj kantkluboj estas malpermesata". Nu, kio do? Se ili volas kanti aŭ muziki, ili do renkontiĝu apartigite kaj ili certe povos kanti. Tuj poste aperas surskribo kaj ordono: "Por judaj nearjaj infanoj la ludado kun germanaj, arjaj infanoj estas malpermesata". Ili ludos solaj. Kaj post tio aperas ŝildo: "Al judoj oni vendas panon nur post la dek sepa horo". Tio ja estas malhelpaĵo, ĉar tiam la elekteblo estas malpli granda, sed finfine oni ja povas iri por aĉeti ankaŭ post la kvina posttagmeze.

Atenton, atenton, ni komenciĝas alkutimiĝi je la penso, ke oni povas ekskludi iun, stigmatizi iun, fremdigi iun. Kaj tiel la homoj lante, pli kaj pli, tagon post tago, intimiĝas pri tio – kaj la viktimoj kaj la faruloj kaj atestuloj, kaj tiuj, kiujn ni nomas apudstarantoj alkutimiĝas je la penso kaj ideo, ke ĉi minoritato, el kiu devenis Einstein, Nelly Sachs, Heinrich Heine kaj la Mendelsohnoj estas io alia, ke ĝi povas esti elpelata el la socio, ke ĝi konsistas el fremdaj homoj, ke tiuj estas homoj, kiuj disvastigas mikrobojn, epidemiojn. Tio vere estas terura, danĝera. Tio estas la komenciĝo de tio, kio povas tuj sekvi.

La tiamaj potenculoj unuflanke faris ruzan politikon, ĉar ili ekz. plenumis la postulojn de la laboristoj. La 1a de majo neniam antaŭe estis festita en Germanio, sed ili ja faras tion, jes. Je la senlabora tago ili enkondukas "Forto per ĝojo". Elemento de laborista feriado, do. Ili kapablas superi la senlaborecon, ili povas ludi per la nacia digno: "Germanoj, stariĝu el la malgloro de Versailles. Regajnu vian fieron". Kaj samtempe la potenculoj ekkonas, ke la homoj pli kaj pli estas kaptataj de sensentemo, de indiferenteco. Ili ĉesas reagi al la malbono. Kaj jen la potenculoj povas permesi al si pluakceli la proceson de la malbono.

Poste la alio rapidege sekvas: la malpermeso dungi judojn, la malpermeso vojaĝi eksterlanden. Kaj post tio rapide sekvas la deportado en getojn. Al Riga, Kaŭno, en mian geton, la geton de Lodz Litzmanstadt. De kie la plej multaj estas transportataj al Kulmhof am Ner, kie ili estas mortigitaj en kamionoj per elĵetgasoj, kaj la resto venas al Aŭŝvico, kie ili estas murditaj en modernaj gaskameroj per ciklono B. Kaj jen pruviĝas vera, kion diris la aŭstra federacia prezidento: "Aŭŝvico ne falis el la ĉielo". Aŭŝvico trotetis, faris etajn paŝojn,

alproksimiĝis ĝis kiam okazis, kio okazis, ĉi tie.

Mia filino, mia nepino kaj vi, la samaĝuloj de mia filino kaj de mia nepino – eble vi ne konas la nomon de Primo Levi. Primo Levi estis unu el la plej famaj arestitoj de ĉi koncentrejo. Primo Levi iam uzis la jenan formulon: "Ĝi okazis, kaj sekve ĝi denove povas okazi". Tio signifas, ke ĝi povas okazi ĉie en la mondo.

Mi nur volas dividi kun vi unu el miaj personaj spertoj: 1965 mi estis stipendie en Usono, en Ameriko, kaj tiam estis la kulmino de la lukto por homaj rajtoj, civitanaj rajtoj, por rajtoj de la afroamerika loĝantaro. Estis honoro por mi partopreni en la Selma-Montgomery-marŝo kun Martin Luther King.

Kaj tiam la homoj, kiam ili eksciis, ke mi estis en Aŭŝvico, demandis min: "Kion vi pensas, ĉu tiu aĵo estis ebla nur en Germanio? Aŭ ĉu ĝi povas okazi ankaŭ aliloke?" Kaj mi diris al ili: "Tio povas okazi ankaŭ ĉe vi. Se estas lezataj civitanaj rajtoj, se ne estas respektataj la rajtoj de minoritatoj, se oni abolas ilin. Se oni distordas la leĝon tiel, kiel okazis en Selma, tiam ĝi povas okazi". "Kion oni povas fari kontraŭ tio?" "Vi mem povas fari tion", mi diris al ili. "Se vi kapablas defendi vian konstitucion, viajn rajtojn, vian demokratian ordon, protektante la rajtojn de minoritatoj – tiam vi povas venki ĝin".

Ni en Eŭropo plejparte devenas de la juda-krista tradicio. Kaj kredemaj kaj nekredemaj homoj rigardas la dek ordonojn sia civiliza kanono. Mia amiko, la prezidento de la Internacia Aŭŝvico Komitato, Roman Kent, kiu antaŭ kvin jaroj ĉi-loke faris paroladon okaze de la pasinta aranĝo, ne povis veni hodiaŭ. Li elpensis dekunuan ordonon, kiu prezentas la spertadon de la ŝoaho, de la holokaŭsto, de la horora epoko de malestimo.

Ĝi tekstas: *Vi ne estu indiferentaj!*

Kaj tion mi volonte dirus al mia filino, tion mi volas diri al miaj genepoj. Al la samaĝuloj de mia filino, de miaj genepoj, kie ajn ili vivas: en Polio, en Israelo, en Ameriko, Orienteŭropo, Okcidenteŭropo. Tio ege gravas.

*Ne estu indiferentaj*, kiam vi vidas historiajn mensogojn!

*Ne estu indiferentaj*, se vi vidas, ke la pasinteco estas mistraktata por aktualaj politikaj celoj!

*Ne estu indiferentaj*, se iu minoritato estas diskriminaciata! La esenco de la demokratio konsistas en tio, ke la majoritato regas kaj la minoritatoj devas esti protektataj.

*Ne estu indiferentaj*, se iu registaro rompas jam ekzistantajn, kutimajn sociajn kontraktojn! Estu lojala al la ordono. Al la dekunua ordono:

*Ne estu indiferentaj!*

Ĉar se vi estos indiferentaj, de unu momento al alia, iu Aŭŝvico subite falos el la ĉielo, sur vin kaj sur viajn posteulojn.

Laŭ dokumento de la Internacia Auschwitz Komitee
Stauffenbergstrasse 13/14, 10785 Berlin
www.auschwitz.info

# Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj

## *Ili montris al ni neordinaran bonecon* (Ago 28, 2)

### Teologia kaj pastorala enkonduko al la temo

Tradukis IKUE-anoj kaj aliaj bonvolaj Esperantistoj

Tuta teksto ĉe: drive.google.com/file/d/1yApkMhP17elURjf5bfe-umAY8uFpxcV_t

La tekstojn por la *Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj de 2020* pretigis la kristanaj Eklezioj en Malto kaj Gozo (Unuiĝintaj Kristanoj en Malto). La 10-an de februaro, multaj kristanoj en Malto celebras la feston de ŝiprompiĝo de Sankta Paŭlo, substrekante kaj dankante la alvenon de kristana kredo al tiuj insuloj. La legaĵo de la Agoj de Apostoloj uzata en tiu ĉi festo estas la teksto elektita por la Semajno de Preĝado de tiu ĉi jaro.

La historio komenciĝas per la alkonduko de Paŭlo al Romo kiel enkarcerigito (Agoj 27, 1). Paŭlo estas enprizonigita, sed eĉ dum vojaĝo fariĝanta danĝera la misio de Dio daŭras per li. Tiu ĉi rakonto estas klasika dramo de la homaro alfrontata de la timegiga potenco de la naturaj elementoj. La pasaĝeroj estas senprotektaj antaŭ la forto de maro malsupre kaj la potencaj tempestoj stariĝantaj ĉirkaŭ ili. Tiaj fortoj kondukas ilin al nekonata teritorio, kie ili estas perditaj kaj sen esperoj.

La 276 homoj sur ŝipo konsistas el apartaj grupoj. La centestro kaj liaj soldatoj havas potencon kaj aŭtoritaton, sed dependas de la lerteco kaj spertoj de la ŝipistoj. Kvankam ĉiuj estas timigitaj kaj senprotektaj, la malliberuloj estas la plej senprotektaj el ĉiuj. Iliaj vivoj estas taksataj kiel forlaseblaj, ili riskas suferi kruelan ekzekutadon (laŭ 27, 42). Dum la disvolviĝo de la rakonto, sub premo kaj timantaj pri siaj propraj vivoj, eblas vidi la malfidon kaj la suspekton kiuj pligrandigas la dividojn inter la diversaj grupoj.

Notinde, tamen, Paŭlo elstaras kiel centro de paco ene de la tumulto. Li scias, ke lia vivo ne estas estrata de fortoj indiferentaj al lia destino, sed ĝi estas sekura je la manoj de Dio, al Kiu li apartenas kaj servas (laŭ 27, 23). Pro sia kredo, li havas fidon, ke li staros antaŭ la imperiestro en Romo, kaj per la forto de sia kredo li povas stari antaŭ siaj samŝipanoj kaj glori Dion. Ĉiuj kuraĝiĝas. Sekvante la ekzemplon de Paŭlo, ili dividis inter si la panon, unuiĝintaj en nova espero kaj fidantaj je liaj vortoj.

Tio ĉi indikas la ĉefan temon de tiu ĉi okazintaĵo: la Dia providenco. La decido navigi en malbona vetero estis de la centestro, sed dum la tempesto la ŝipistoj faras decidojn pri la maniero regi la ŝipon. Sed, fine, iliaj planoj mem estas ŝanĝitaj kaj, nur restante kune kaj permesante la sinkadon de la ŝipo, ili sukcesas esti savitaj de la Dia providenco. La ŝipo kaj ties valorega ŝarĝo perdiĝos, sed ĉiuj vivoj

saviĝos, “eĉ unu haro ne pereos el la kapo al vi ĉiuj” (laŭ 27, 34; Luk 21, 18). Dum nia klopodo por la kristana unueco, nia sindono al la Dia providenco postulos, ke ni lasu flanke multajn aferojn, al kiuj ni estas profunde ligitaj. Gravas al Dio la saviĝo de ĉiuj homoj. Tia grupo de homoj diversaj kaj konfliktantaj atingas insulon (laŭ 27, 26). Enirintaj kaj enirigitaj en la sama ŝipo, ili atingas la saman destinon, kie ilia humana unueco manifestiĝas per la akceptemo, kiun la loĝantoj de la insulo montras al ili. Unuiĝintaj ĉirkaŭ fajro, ĉirkaŭitaj de popolo kiu ne konas nek komprenas ilin, iliaj diferencoj de potenco kaj sociala klaso forflugas. La 276 homoj ne plu estas dependantaj de indiferentaj fortoj, sed ĉirkaŭataj de la amema providenco de Dio, Kiu montras Sin ĉeestanta pere de popolo, kiu montras al ili “neordinaran bonecon” (laŭ 28, 2). Sentantaj malvarmon kaj malsekaj, ili povas varmiĝi kaj sekiĝi proksime de la fajro. Malsatantaj, ili ricevas manĝaĵon. Oni loĝigas ilin ĝis la vetero donas sekurecon al ili por daŭrigi la vojaĝon.

Nuntempe multaj homoj alfrontas turmentojn similajn sur tiuj samaj maroj. La samaj lokoj menciitaj en la legita teksto (laŭ 27,1; 28,1) ankaŭ apartenas al la historioj de la migrantoj de modernaj jaroj. En aliaj partoj de la mondo multaj aliaj homoj faras vojaĝojn egale danĝerajn surtere kaj surmare por eskapi el naturaj tragedioj, militoj kaj malriĉeco. Iliaj vivoj ankaŭ estas senprotektaj antaŭ nemezureblaj kaj malvarme indiferentaj potencoj – ne nur naturaj, sed ankaŭ politikaj, ekonomiaj kaj homaj. Tiu homa indiferenteco havas plurajn formojn: la indiferenteco de tiuj, kiuj vendas lokojn en neadekvataj barkoj al nepretaj homoj; la indiferenteco kondukanta al la decido ne sendi helpobarkojn; la indiferenteco, kiu forvojaĝigas barkojn kun enmigrantoj. Tiuj ĉi estas nur kelkaj ekzemploj. Kiel kristanoj unuiĝintaj alfrontantaj la krizojn de enmigrado, tiu historio defias nin: ĉu ni apogas la malvarmajn potencojn de indiferenteco aŭ ni montras “neordinaran bonecon” kaj fariĝas atestantoj de la amema providenco de Dio al ĉiuj homoj? La gastamo estas virto multe bezonata en nia klopodo por kristana unueco. Ĝi estas agado kiu kondukas nin al pli granda malavareco favore al la bezonantoj. La homoj kiuj montris neordinaran bonecon al Paŭlo kaj liaj kunuloj ankoraŭ ne konis Kriston, sed, eĉ en tia kondiĉo, per ilia neordinara boneco la dividiĝinta popolo fariĝas pli kaj pli unuiĝinta. Nia kristana unueco mem estos trovata ne nur per reciproka montrado de gastamo inter unuj kaj aliaj, kvankam tio estas tre grava, sed ankaŭ per amikecaj renkontiĝoj kun tiuj, kiuj ne apartenas al nia lingvo, kulturo aŭ kredo.

En tiaj vojaĝoj tempestaj kaj sporadaj renkontiĝoj, la volo de Dio al la Eklezio kaj al ĉiuj homoj estos plenumita. Laŭ kiel Paŭlo proklamos en Romo, la savado de Dio estas sendata al ĉiuj popoloj (laŭ Ago 28, 28).

# Apostoloj kaj iliaj atributoj

Parto 7

Ágnes Ráczkevy-Eötvös, HU


En la antaŭaj partoj de mia artikol-serio vi povis legi pri dekunu apostoloj. Nun ni alvenas al la malfacila demando: kiu estu la dekdua apostolo?

La "origina" dekdua apostolo kompreneble estis Judaso Iskariota. Laŭ kelkaj opinioj li devenis el la suda parto de Judeo. Li zorgis pri la mono de la "dekdu", kaj li fariĝis tiel mon-ema, ke li perfidis Jesuon por mono – pro tio estas lia atributo la tridek arĝentaj moneroj. Kiam li vidis, ke oni mort-verdiktis Jesuon, li mortigis sin mem.



Detalo de mura pentraĵo pri la memmortigo de Judaso Iskariota





La plej ofta situacio, en kiu artistoj pentris aŭ skulptis lin, estas la momento de la perfida kiso, aŭ li estas montrita kiel simbolo de malbona konscienco – kun la tridek arĝentaj moneroj.

Sankta Nicetas Preĝejo, Banjani



## Matiaso

Ni legas en la Agoj de apostoloj (la fino de 1,20 ) pri Judaso Iskariota: *Lian oficon transprenu iu alia*. Kaj poste (1,21–26): *El tiuj viroj, kiuj kuniradis kun ni la tutan tempon dum la Sinjoro Jesuo estis ĉe ni, ekde la bapto de Johano ĝis la tago, kiam li estis forprenita de ni, <el tiuj do> unu devas kune kun ni fariĝi atestanto pri lia resurekto. Kaj oni proponis du <personojn>: Jozef kun la kromnomo Barsabas, ankaŭ nomata la Justa, kaj Matias. Ili jene preĝis: Sinjoro vi konas ĉies koron: montru kiun el ĉi du vi elektis por transpreni la lokon en ĉi apostola servado, kiun forlasis Judaso por iri sian vojon. Kaj oni lotumis inter ili, kaj la loto indikis Matiason, kaj tiel li alkalkuliĝis al la dek unu apostoloj*.

Pri la vivo de Matiaso ni ne multon scias. Oni supozas, ke li naskiĝis iam je la komenco de la unua jarcento en Judeo. En la Biblio ni legas nur pri tio, kiel li estis elektita al la loko de Judaso Iskariota, nek lia antaŭa, nek lia posta vivo estas konata.



Laŭ la apokrifa skribaĵo “Agoj de apostoloj Andreo kaj Matiaso” kiam oni disigis la misiajn teritoriojn, li ricevis la “landon de la kanibaloj”. Tie oni blindigis Matiason kaj fermis lin en prizonon, sed Dio redonis lian vidkapablon kaj Andreo mirakle sukcesis liberigi lin.

La martiran morton li suferis per senkapigo — pro tio estas lia atributo la hakilego.

(Rim: en pasinta numero mi erare indikis ke la sesa parto estis la lasta parto. /red)






# Kongresa informo

Kristana Kongreso (kadre de 70-a KELI-kongreso)

## Legnica 8–15.08.2020

https://keli.sea-vroc.eu/

Aliĝintoj ĝis 9 februaro 2020

| | | |
|---|---|---|
| 1. | Bengt Olof Aradsson | Svedio |
| 2. | Ágnes Ráczkevy-Eötvös | Hungario |
| 3. | André Aradsson | Hungario |
| 4. | Petr Chrdle | Ĉeĥio |
| 5. | Teresa Pomorska | Pollando |
| 6. | Pastro Kazimierz Noculak | Pollando |
| 7. | Philippe Cousson | Francio |
| 8. | Samuel Gaillard | Francio |
| 9. | Bogdan Dembiec | Pollando |
| 10. | Ewa Tracz | Pollando |
| 11. | Oldřich Arnošt Fischer | Ĉeĥio |
| 12. | Gabriella Stier | Rumanio |
| 13. | Henryk Borkowski | Pollando |
| 14. | Pavol Petrik | Slovakio |
| 15. | Karl Heinz Schaeffer | Germanio |
| 16. | Hedwig Schaeffer | Germanio |
| 17. | Józefa Gregorowicz | Pollando |
| 18. | Małgorzata Gregorowicz | Pollando |
| 19. | Grażyna Niedużak-Mazurek | Pollando |
| 20. | Bogusława Bronowska | Pollando |
| 21. | Eugenia (Kati) Popoviciu | Rumanio |
| 22. | Adam Tadeusz Leżak | Pollando |
| 23. | Pavel Polnicky | Ĉeĥio |
| 24. | Bernarda Wiewiórska | Pollando |
| 25. | Małgorzata Bonarek | Pollando |
| 26. | Józef Ptasznik | Pollando |
| 27. | Halina Kuropatnicka-Salamon | Pollando |
| 28. | Elżbieta Krawiec | Pollando |
| 29. | Jerzy Stefański | Pollando |
| 30. | Maria Laslo | Hungario |
| 31. | Terezia Scurt | Rumanio |
| 32. | Maria Brylowska | Pollando |
| 33. | Mieczysław Chudkowski | Pollando |
| 34. | Jaroslav Chodníček | Ĉeĥio |
| 35. | Miloslav Šváček | Ĉeĥio |
| 36. | Andrzej Kosiński | Pollando |
| 37. | Siegfried Krüger | Germanio |
| 38. | Katarzyna Tempczyk | Pollando |
| 39. | Kornel Szwajewski | Pollando |
| 40. | Alois Klumpar | Ĉeĥio |
| 41. | Marie Klumparova | Ĉeĥio |
| 42. | Jan Kovář | Ĉeĥio |
| 43. | Antoni Gradek | Pollando |
| 44. | Zofia Śmistek | Pollando |
| 45. | Bożena Kocyk | Pollando |
| 46. | Marian Kocyk | Pollando |
| 47. | Jolanta Kieres | Pollando |
| 48. | Zdzisława Kaźmierczak | Pollando |
| 49. | Mirosława Kubicka | Pollando |
| 50. | Jiří Studený | Ĉeĥio |
| 51. | Pavla Studená | Ĉeĥio |
| 52. | Edward Wojtakowski | Pollando |
| 53. | Marek Dąbrowski | Pollando |
| 54. | Barbara Lipska | Pollando |
| 55. | Alina Mozer | Pollando |
| 56. | Wojciech Ławnikowicz | Pollando |
| 57. | Maria Korzybska | Pollando |

# Informetoj

## Josef Pokorný – 100 jara

Okaze de lia jubileo mi vizitis lin en Domo de pensiuloj en Hořice v Podkrkonoší, kie li vivas en bela 1-lita ĉambro. Mi gratulis al li nome de kelifamilio kaj transdonis al li novan Biblion (lia jam estas tre difektita de la ĉiutaga legado) kaj libreton Preĝo por ĉiu tago. Lia psika kaj korpa stato estas enviinda. Li nur malbone aŭdas. Dum la pli ol trihora mia restado li multe rakontis pri sia vivo kaj familio kaj mi notis kaj esperantigis almenaŭ parton de tio:

Mi naskiĝis 1. 2. 1920 en Hořice v Podkrkonoší en loka kastelo, kie loĝis miaj gepatroj kun 4-jara frato. Mia patrino estis vendistino kaj patro estis



seruristo. Li estis alvokita militservi kaj nur post kelkaj tagoj en Italio eksplodo blindigis lin. Post la restado en malsanulejo en Graz kaj en blindula centro en Brno li revenis al Hořice. Liberan tempon li dediĉis al muziko (violono kaj gitaro) kaj ankaŭ komencis lerni de s-ro Munzar Esperanton. Do, mi kiel knabo ankaŭ komencis ludi tiujn instrumentojn kaj malrapide mi fariĝis esperantisto. Miaj gepatroj estis membroj de Libera reformita eklezio (nun Eklezio frata) kaj mi estis edukita en kristana medio. Mi vizitis bazan kaj mezan lernejon en Hořice kaj komencis labori en Liberec kaj poste mi revenis al Hořice kaj tie mi pli ol 30 jarojn laboris en maŝinfabriko kiel prizorganto de necesaj materialoj por laboristoj.. Tutan vivon mi aktivis en eklezio kaj membris en ĉeĥa sekcio de KELI.

*Foto kaj teksto Pavel Polnický*

Noto: Se vi volas gratuli al li, skribu al:
Josef Pokorný,
Domov důchodců,
Riegrova 2111
50801 Hořice v Podkrkonoší,
Ĉeĥio

# Kun vi, Maria, kantas ni

(ekumena Maria-kanto)

## Chercher avec toi, Marie,
## Mit dir, Maria, singen wir




3.
Sanktan Vendredon staras vi
ĉe via fil', la krucumit',
kaj Pentekoston trafas vin
la fajra ŝtorm' de l' Di-Spirit'.

4.
Via jubil' infektas nin.
Paskece sonas son' post son'.
Faris grandaĵojn Di' al vi.
Grandaĵojn faras Li al ni.

5.
Kiom majestas Lia nom',
la nom' de Di', la Di' de l' glor'!
Jen, kiom grandas ĉiu hom',
ĉar kronis Di' lin per honor'.

6.
Hele radias via kant'
tra ĉiu nokt', tra ĉiu land'.
Venos Jesu', satigos nin,
riĉigos nin, altigos nin.

CHERCHER AVEC TOI, MARIE • MIT DIR, MARIA, SINGEN WIR • nGL (Speyer) 880, (Freiburg) 887 • M kaj franca T: el Chartres, Jean-Claude Gianadda (* 1944) • © Studio SM, Varades • germana T: Eugen Eckert (* 1954) • © Strube Verlag, München • E (el la germana; strofoj 2, 3 kaj 5 originale verkitaj): Albrecht Kronenberger 2019-11-27 • Luk 1,46-55; 2,13-14 • Psa 8